



Federation of Young European Greens (FYEG)

Federacio de Junaj Eŭropaj Verduloj

La Federacio de Junaj Eŭropaj Verduloj (FYEG) estas fondita en 1988 en Belgio, kun la celo unuigi junajn ekologiajn kaj verdulajn politikajn grupojn el ĉiuj partoj de Eŭropo por instigi kaj reciprokan interkomprenon kaj reciprokan agadon por antaŭenigi pli verdan Eŭropon. Ĝia oficejo troviĝas en Bruselo, la politika koro de EU. La celo de la federacio estas eŭroponivele strebi al media kaj socia justeco.

Membroj:

FYEG rapidege kreskis el sia malgranda sed ambicia kerno kun nur kelkaj membraj organizaĵoj (MOj) el kaj orienta kaj okcidenta Eŭropo. Ĝi nun unuigas 38 MOjn el ĉiuj partoj de Eŭropo. MOj varias laŭ grandeco de 70 ĝis miloj da anoj. Organizaĵoj estas kaj la junularaj sekcioj de verdulaj partioj aŭ ekologiaj NeRegistaraj Organizaĵoj.

Politika agado:

La bazo de la agadoj de FYEG estas nia politika agado sur eŭropa nivelo en eŭropa politika spaco. Ĝi ne limiĝas al kampanjado ene de la eŭropa parlamento. Ne, FYEG ankaŭ okupiĝas sur baza nivelo pri kampanjoj okazantaj kune kun siaj Membraj Organizaĵoj. Samtempe ĝi ne timas starigi temojn rilatajn al demandoj de la lokaj organizaĵoj, subtenante ilin kaj disvastigante ilin tra la tuta reto.

Unu fojon en jaro FYEG gastigas formalan kunsidon, la Ĝenerala Asembleo, kie la MOj per siaj delegitoj decidas pri politiko kaj strategio kaj elektas Estraran Komitaton (EK). La EKa estraro de 7 homoj estas elektata por deĵori dum unu jaro kaj EKaj membroj povas deĵori dum 3 sinsekvaj periodoj. La Estrara Komitato gvidas kaj kunordigas la agadojn de la Federacio. Ne estas gvidantara hierarkio ene de la EK, sed relative plata strukturo kaj sekse ekvilibra komitato. Ĝi ekde 1999 estas helpata de plentempa pagata ĝenerala sekretario.

La opinioj kaj deklaroj de FYEG baziĝas sur la politika platformo, kiu estas diskutata kaj ĝisdatigata ĉiujare en nia Ĝenerala Asembleo.

Agadoj:

FYEG aranĝas seminariojn, studoseancojn, tendarojn, politikajn debatojn, trejnseancojn kaj tiel plu, en diversaj partoj de Eŭropo. FYEG ankaŭ organizas kampanjojn pri esencaj politikaj temoj. La plej freŝdata estis la klimatsanĝiĝa kampanjo nomita "Keep it cool!" (ni retenu la malvarmeton) kaj la kampanjo "Unueco en Diverseco" antaŭeniganta la fundamentajn kulturajn valorojn de la diversaj eŭropaj civitanoj.

Granda plejmulto el niaj membroj aĝas malpli ol 30 jarojn kaj ĉiuj niaj eventoj estas planataj kaj estrataj de junaj sensalajraj aktivuloj el tuta Eŭropo.

Komunikoj:

FYEG publikigas Ecosprinter (eko-kuranto), informilo kiu diskonigas junverdulajn vidpunktojn kaj informas niajn aktivulojn de pasinta kaj okazontaj eventoj. Pli urĝaj aferoj kaj ankaŭ aktuala informo pri tempimoj, komunikaĵoj kaj aliaj novaĵoj estas sendataj al la FYEGa reto per retpoŝta informilo. FYEG ankaŭ havas diversajn retpoŝtlistojn kaj retejojn por diversaj aferoj, kampanjoj kaj projektoj tra la tuta la jaro.

Partnerecoj kaj fokuso:

FYEG estas bone interkonektita sur eŭropa nivelo. Ne nur estas intima komunikado kun la Verdula Grupo en la Eŭropa Parlamento kaj la Eŭropa Verda Partio, kun FYEGaj observantoj kaj partoprenantoj aliĝintaj al ĉiu ĉefa evento de ambaŭ, sed FYEG ankaŭ havas intiman kontakton kun aliaj institucioj, neregistaraj organizaĵoj kaj politikaj grupoj.

Kelkaj el la plej gravaj el tiuj estas la Eŭropa Komisiono kaj la Konsilio de Eŭropo, ĉar ili financas kaj helpas en multaj projektoj kaj eventoj, kiujn FYEG organizas. FYEG ankaŭ havas plenan membrecon en la Eŭropa Junulara Forumo, kiu estas centra spaco por influi politikfaradon en la junulara kampo en Eŭropo. Estas ankaŭ en la kunteksto de la Junulara Forumo, ke okazas multe da kunlaborado kun aliaj junularaj organizaĵoj de diversaj partioj.

Dum la lastaj jaroj la prioritato de FYEG estas nia vastiĝanta reto en centra kaj orienta Eŭropo. Tio reflektiĝas en la freŝdata plena membriĝo de organizaĵoj el Serbio, Bulgario kaj Macedonio, kaj ankaŭ la membrokandidatiĝoj el Ukrainio, Albanio kaj Rumanio. Aliĝinta organizaĵo, nomata Kunlabora kaj Evoluiga Reto por Orienta Eŭropo (CDN), kiu faciligas kontaktojn kun pliaj organizaĵoj estas starigita kaj funkcias bonege.

Estonte la celo de FYEG profundigos sian kunlaboron kun la nunaj tuteŭropaj verdulaj strukturoj kaj ankaŭ profundigos kaj plifortigos la ligojn al la Membraj Organizaĵoj.

<http://www.FYEG.org>

Tradukita de Leo de Cooman, 2010-09 - Asocio de Verduloj Esperantistaj, <http://www.verduloj.org>